

sub la suda kruco ★

ESPERANTO

Somerkursaro 2010

Geedziĝo en Nepalo

**Nova Originala Libro
de Trevor Steele!**

**Internacia Asocio de Mortintaj
Komponistoj**

Instruu Esperanton al via dombesto!

oficiala organo de la aŭstralia kaj nov-zelanda esperanto-asocioj
volumo 18 [1] • numero 101 • marto 2010
ISSN 1038-9380



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Redaktoroj | Chris Krägeloh & Sándor Monostori
Kontaktadreso | esk@esperanto.org.au
P.O.Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub La Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa). Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:
AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – nzea@esperanto.org.nz

Kontribuu al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunktoj, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, “esk@esperanto.org.au”.

Limdato por kontribuoj por la sekva numero:

15 de majo 2010

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj
en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA, aŭ de NZEA.**

Copyright © 2008, AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Sur la kovrilo: Havano, kie la 95-a Universala Kongreso okazos 17-24 julio 2010.



Somerkursaro 2010



AEA Announcements



Geedziĝo en Nepalo




La kartaro



Kongreso en Wellington



Esperanto-historio



Kvazaŭ ĉio dependus de mi



Torquay "Aqua" Presentado



Instruu Esperanton al via dombesto

marto du mil dek

Antaŭparolo

de *Ŝandor Monostori*

Ĉi tiu eldono de ESK enhavas interesajn divers-specajn artikolojn; raportojn pri la januara sidneja somerkursaro, nov-zelanda kongreso kaj komunuma teatraĵo, kiu uzis Esperanton, altnivelajn literaturaĵojn, Esperanto-historiaĵon, kaj amuzajn artikolojn pri ludkartoj, pri komponistoj kaj pri revolucia metodo lerni Esperanton instruante ĝin al via kato aŭ hundo. Mi esperas, ke ĉiuj legantoj trovos edukajn kaj amuzajn legaĵojn ĉi tie. La suba foto montras la partoprenantojn de la ĉi-jara somerkursaro, kiuj malpli nombris ol pasintjare tamen ŝajne bonege fartis. ★

Maldekstre al dekstre:

Starante malantaŭe: Freyer Vos, David Ryan, Alan Bishop, Dmitry Lushnikov, Kirill Lushnikova, Paul Green, Sandra Connors, Kiah Morante, Max Wearing.

Starante antaŭe: Trevor Steele, Yvan Serve, Rita Purdy, Emma Purdy, Sui Yee Chan, Penny Vos, Dianne Lukes, Martin Purdy, Jenny Bishop, Sabine Trenner.

Sidante: Adam Purdy, Hazel Green, Heather Furby, Sophie Furby, Karina Turvey, Jo Turvey.



Sidneja somerkursaro

de Paul Green

La somerkursaro okazis de la 10a ĝis la 23a de januaro ĉe Internacia Domo de la Universitato de Sidnejo.

Estis klasoj por infanoj instruitaj de Penny Vos. Komencantoj kaj komencintoj havis Jo Turvey kaj Sabine Trenner el Germanujo kiel instruistoj, kun helpo de Jonathan Moylan. Trevor Steele instruis la progresintan grupon.

Krom aŭstraliaj studentoj estis unu de Nov-Kaledonio kaj kelkaj el Nov-Zelando.

Lecionoj okazis dum la matenoj, kaj posttagmeze estis ekskursoj al la urbocentro, al plaĝoj, kaj sabaton al la bestoĝardeno Taronga. Ni vizitis la operan domon, kaj transiris laŭ la havena ponto.

Tre diligenta kaj ĝentila juna studento el Internacia Domo, Daniel, estis nia gvidanto por nia semajnduo en Sidnejo.

Ĉiuj esperantistoj ĝuis sian tempon en la 2010 somerkursaro. ★

Trevor instruis laŭ du libroj, kaj devis helpi memoradon de novaj vortoj.



Jean Ribillard (1904 - 1962.)

- 4 vortoj rilate al fajro
- 4 legemoj
- 4 birdoj
- 4 verboj por sono el homa korpore
- 4 vortoj uzataj por trakti vundojn

Somerkursaro 2010

de Dmitry Lushnikov

AESK 2010 estis la dua somerkursaro en Sidnejo por mi, do, mi povas kompari miajn impresojn. Ĉe la dua mi estis tre ĝoja renkonti miajn malnovajn amikojn tie kaj konatiĝi kun novaj amikoj. Bonŝance mi studis en la klaso de Trevor Steele kaj tio estis tre utila kaj interesa por mi. En la klaso ni legis originalajn librojn de Jean Ribillard. Bedaŭrinde mia nivelo de Esperanto ne estis sufiĉe alta por kompreni ĉion tamen mi lernis multajn novajn Esperantajn vortojn kaj frazojn. Pli grave por mi estis partopreno de miaj gefiloj en la somerkursaro. Mia filo lernis en la klaso por komencantoj kaj estis tre kontenta komenci lerni Esperanton. Por mia filino klaso por infanoj estis alia ŝanco renkonti novajn amikojn. Mi estas tre feliĉa, ke ankaŭ miaj gefiloj tre ŝatis la somerkursaron. Dankon al ĉiuj kiuj organizis kaj helpis konduki AESK 2010 en Sidnejo! ★

Dmitry Lushnikov alvenis kun la rusia grupo pasintjare, kaj nun loĝas ĉi tie en Aŭstralio kun sia familo.

Maldekstre al dekstre:

Starante: Trevor Steele, Rita Purdy, Sabine Trenner, Jenny Bishop, Sandra Connors, Dianne Lukes, Tim Stackpool, Martin Purdy, Daniel de International House, Paul Green.
Sidante: Freyer Vos, Adam Purdy, Emma Purdy, Alan Bishop



Fotisto: Kam Lee

AESK 2010

Aŭstrala Esperanto Somerkursaro

de Hazel Green

Ĉi-jare la januara somerkursaro por Esperanto estis malgranda: ial la kutima nombro de studentoj kaj ekskursantoj ne aliĝis. Tio postulis iom da replanado, sed finfine la du semajnoj ja estis ĝueblaj kaj utilaj.

Sabine Trenner el Germanujo eskapis la teruran eŭropan neĝon por kunporti al nia suda kursaro viglajn lecionojn, internacian etoson, kaj multo da amuzo. Nu, eble ni iomete plendis dum la luda vespero organizita de Sabine: ni devis kuri tien kaj reen por trovi numerojn kaj poste cerbumi kaj esti kreemaj. Sed mi devas konfesi, ke ni ĝuis la sperton.

Gratulon al la komencantoj kaj komencintoj en la kursaro – ili bone partoprenis, kaj estis bele vidi la progreson en la uzado de Esperanto. Siu Yee, kiu estis komencanto en la komenca tago, instruis nin ĉiuj en “Korelativa Dancado” dum la fina vespera.

Niaj instruistoj Penny Vos, Jonathan Moylan, Sabine Trenner, Jo Turvey, kaj Trevor Steele multe laboris por certigi, ke ni ne nur ĝuis nian restadon en Sidnejo, sed ankaŭ lernis multon. ★

Sabine kaj Ĝo kun pluraj de siaj studentoj.




AEA Announcements

by Dianne Lukes

Call for Nominations

2010 is an election year for the board of AEA. As usual, all positions on the board will become available and nomination forms will come out later this year. Now is a good time to consider if you would like to nominate and help out as a board member! After nominations are received, the voting will be conducted via a postal vote for all voting members of AEA. The results of the postal vote will be announced at the next Annual General Meeting (AGM) where the new board members will take up their appointments for the next 2 years. We welcome your suggestions and any help you may be able to offer AEA and Esperanto.

Dianne Lukes



AGM of the AEA

It has been decided that instead of holding a Congress this year AEA will concentrate its energy and resources into supporting the Centenary Jubilee of Esperanto in Australia being conducted in Adelaide in July, 2011. At the same time, as this is an election year for new office bearers for AEA, it is important that we have a well attended AGM to welcome any new directors or even a new president. The AGM will be held on a weekend in November, 2010, in Australia's capital city, Canberra. We have chosen Canberra again because of its centrality to Sydney, Melbourne and the NSW south coast area. Also to support the KKK, the Canberra Coffee Club, one of our new Esperanto clubs.

Talking to the Whole Wide World

While in Canberra we also may be able to offer help to the important project of Penny Vos to have Esperanto taught in primary schools throughout Australia, as a precursor to Australian children having a real chance of succeeding in an Asian or European language in High School. This project has the potential that all primary school teachers will also be Esperantists 5 years after it starts. See www.mondeto.com

Summer Schools in Sydney

After two really wonderful Summer Schools at Sydney Uni's International House it is sad to have to announce that we will not be conducting a Summer School there in 2011. This is also in support of the Centenary Jubilee in Adelaide, 2011. But in 2012 there will be a revamped Summer School in a newly renovated International House. With nearly two years to prepare, we hope to make it something very special.

Youth Camp or Family Get-together

Next summer we still may have a Youth Camp or a Family Get-together if we can find a suitable venue that will be interesting but cheap enough for young people and families. If anyone knows of such a place, contact: Alan or Jo Turvey on 0243628287. ★

**"in 2012 there will
be a revamped
Summer School"**

Geedziĝo en Nepalo

Kialo por Esperanto-Renkontiĝo!

de Miranda Lutz

La geedziĝo de Miranda kaj Pasa dum januaro 2010 donis bonegan oportunon por multaj esperantistoj kuniĝi. Ni kreis oportunojn por aŭstraliaj kaj nepalaj esperantistoj renkontiĝi por babilado, manĝado kaj (d)trinkado, antaŭ, dum, kaj post la vera ceremonia tago de la geedziĝo. Grupo da esperantistoj ofte renkontis unu la alian ĉe la kafejo de nova esperantisto, Vijay, kie ankaŭ okazis la festo dum la tago de la ceremonio. Multaj esperantistoj, familianoj kaj amikoj ĉeestis la ceremonion en la hinda templo nomata Badrakali kiu situas en Katmanduo, la ĉefurbo de Nepalo. Post la ceremonio grupo vizitis belegan lokon la "Ĝardeno de Sonĝoj" (en la foto). Dum la vespero ni kune trinkis kaj manĝis kaj certe babiladis kaj dancis. Dum la tago estis interesa

Group photo at the Garden of Dreams

Photos taken by Andrew Lutz



miksaĵo de lingvoj - Esperanto kaj la angla, nepala kaj newara lingvoj (la indiĝena lingvo de la familio de Pasa). Estis bone renkontiĝi kun bonaj amikoj de Nepalo kaj vidi la ĝojon de la ĉeestantoj. Miranda kaj Pasa dankas al ĉiuj kiuj sendis bondezirojn. ★

Pasa and Miranda getting married in the Hindu temple, Bhadrakali, in Kathmandu, Nepal.



La kartaro

Kartludoj – enkonduko al la ĝeneralaj terminoj de kartludoj

de Donald E Rogers

Jen mallonga enkonduko pri la terminoj de kartludoj por tiuj, kiuj volas ludi kartojn kun aliaj esperantistoj. Ĝi celas nov-zelandajn kaj aŭstraliajn esperantistojn, do anglaj terminoj estas uzataj por helpi. Por montri la devenon, foje alilingva termino estas menciita.

La kartaro

Ekzistas diversaj kartaroj. Ĉi tiu artikoleto temas ĉefe pri tiuj kartludoj, kiujn oni ludas per la kutima kartaro kiu enhavas 52 kartojn, foje kun unu aŭ du specialaj kartoj, kiuj nomiĝas ĵokeroj. La 52 kartoj konsistas el du koloroj – ruĝa kaj nigra. La ruĝaj kartoj estas de du emblemoj – karoj ♦ aŭ keroj ♥; la nigraj estas de pikoj ♠ aŭ trefoj ♣. Ĉiu emblemo havas 13 valorojn: de 1 ĝis 13, sed la 1a nomiĝas aso (A), la 11a nomiĝas fanto (J), la 12a damo (Q) kaj la 13a reĝo (K). Individuaj kartoj nomiĝas laŭ sia emblemo kaj rango, ekzemple, karoa aso (♦A), trefa du (♣2), pika reĝo (♠K), ĵokero, ktp.

Kartludoj

Ekzistas multaj kartludoj, kaj multaj familioj de similaj kartludoj, bazitaj sur la samaj principoj sed je diversaj niveloj de komplekso, ekzemple kanasto (ludata per du kartaroj plus kvar ĵokeroj), sambo (tri kartaroj plus ses ĵokeroj), bolivio (tri kartaroj plus ses ĵokeroj, la duoj agas kiel ĵokeroj). Ekzistas diversaj lokaj variaĵoj kun iom malsamaj reguloj, ekzemple, la diversaj variaĵoj de pokero. Kiel ekzemplo, troviĝas sube la reguloj por la ludo eŭkro.

Terminoj

ludo = *game*

brigo = *bridge*

eŭkro = *euchre* (el germana dialekto Jucker(*spiel*))

kanasto = hispane *canasta* (korbo) = *canasta*

kribaĝo = *cribbage*

pinoklo = *pinochle*

pokero = *poker*

solitero = france *solitaire* = *patience*

visto = *whist*

emblemo = *suit*

karo = fr *carreau* = *diamond* ♦

kero = fr *coeur* = *heart* ♥

piko = fr *pique* = *spade* ♠ (itale *spade* = glavoj)

trefo = fr *trèfle* (trifolio) = club ♣

rango = *rank*

aso = *ace* A

reĝo = *king* K

damo = *queen* Q

fanto = *jack* J (soldato, paĝio aŭ fripono)

ĵokero = *joker* (klaŭno)

atuti = *to trump*

atuto = fr *atout* = *trump*

sen atuto = *no trumps*

bildkaŝe = *face down*

bildmalkaŝe = *face up*

brigi = *to play bridge*

disdonanto = *dealer*

disdoni = *to deal*

dismeti = *to deal*

farmisto = germana *Bauer* = *bower* (en Euchre, 500 ktp)

figura karto = *court card* (br), *face card* (us)

fini = *to go out* (put out last card(s) in hand)

grupo = *group* (of three or more cards of the same rank)

kartaro = *pack of cards*

malkaŝi = *disclose, meld, lay out* (cards on table)

mano = fr *main* = *hand* (the cards in a player's hand)

partio = *round, game*

pasi = *to pass* (miss a turn)

(karto)preno = *trick*

rezervo = *stock* (undealt cards)

robro = *rubber* (en briĝo, ĉiu el la partioj kun la sama kunludanto)

forĵetaĵo = *discard pile*

sekvenco = *sequence* (of cards of consecutive rank)

ŝlemo = *slam* (en visto, briĝo - gajno de ĉiuj prenoj)

talono = fr *talon* (kalkano) = *stock*, (la kartoj lasitaj sur la tablo post la disdono)

Reguloj de Eŭkro laŭ Hoyle

Eŭkro originis inter la nederlandanoj en Pensilvanio en Usono antaŭ 1864. La termino *bower* estas germana *Bauer* (farmisto), unu el la nomoj por la fanto. El Eŭkro venis la ludo *Kvincent*.

Ludantoj: de tri ĝis sep. La kvarmana ludo kun partneroj estas klarigita ĉi tie.

Kartoj: 32 kartoj: formetu el ordinara kartaro de 52 ĉiujn 2, 3, 4, 5, 6.

La plej alta atuto estas la fanto, nomita la dekstra farmisto. La dua estas la alia fanto de la sama koloro, nomita la maldekstra farmisto. Ekzemple, se pikoj estas atutoj, la pika fanto estas la dekstra farmisto kaj la trefa fanto estas la maldekstra farmisto. La resto de la atuta emblemo rangas jene: A, K, Q, 10, 9, 8, 7. Se la partio estas sen atuto, la rangoj estas: A, K, Q, J (sed ne la maldekstra farmisto), 10, 9, 8, 7.

Disdonado: ĉiu ludanto ricevu po kvin kartoj en grupoj de tri kaj du, aŭ du kaj tri. (La disdonanto devas daŭri laŭ la plano elektita de li). La sekvan karton metu bildkaŝe sur la tablo. Tiu estas la turnita karto. La resto de la kartoj estas la talono. Lasu ilin bildkaŝe sur la tablo.

Atutigo: la turnita karto proponas la atutan emblemon por tiu partio, sed ĝi atutiĝas nur se iu ludanto akceptas ĝin. Komencante ĉe la ludanto maldekstre de la disdoninto, ĉiu ludanto sinsekve rajtas pasi aŭ akcepti la emblemon (se neniu akceptis ĝin antaŭ li). Oponanto de la disdoninto akceptas dirante "Mi ordonas vin prenu ĝin". La partnero de sola disdoninto diras "Mi helpas". La disdoninto diras "Mi prenas ĝin".

Se ĉiuj kvar ludantoj pasis (disdoninto pasas dirante "Mi turnas ĝin bildkaŝe" kaj turnas ĝin. Tiam ĉiu ludanto maldekstren havas duan ŝancon pasi aŭ nomi la atutan emblemon (se neniu faras tion antaŭ li). La nomita emblemo devas esti malsama al la turnita karto.

Kiu decidas la atutan emblemon, aŭ akceptante la turnitan karton aŭ nomante la atutan emblemon en la dua rondiro, tiu estas la atutiganto. La atutiganto rajtas diri "Mi ludos sola", kaj tiukaze ties partnero devas ne ludi en tiu partio. Ajna oponanto de la atutiganto rajtas diri "Mi defendas sola", kaj tiukaze ties partnero devas ne ludi.

Ludado: se la turnita karto estas akceptita, la disdonanto rajtas uzi ĝin kiel parton de sia mano, elmetante alian karton bildkaŝe. (La turnita karto kutime restas sur la tablo ĝis kiam la disdonanto uzas ĝin).

Kontraŭ sola atutiganto, komencas la maldekstrulo. Alikaze komencas la ludanto ĉe la maldekstro de la disdonanto.

Oni ludas la manojn laŭ kvin prenoj. Ludanto devas uzi la saman emblemon kiel la unua karto de la preno, se eblas. Se ne eblas la sama emblemo, li rajtas meti ajnan karton. Gajnas la prenon la plej altranga atuto en ĝi, aŭ se mankas atuto, la plej altranga karto de la emblemo de la komenco. La gajninto de la preno komencas la sekvantan.

Poentoj: nur la teamo kiu gajnas tri aŭ pli prenoj ricevas poentojn. Gajni ĉiujn kvin prenoj nomiĝas ŝlemo. Kiam la atutiganta teamo malsukcesas ĝi estas eŭkrita.

La atutigantoj, ludante kune, ricevas unu poenton por 3 aŭ 4 prenoj aŭ 2 por ŝlemo. Sole ludanta atutiganto ricevas 1 poenton por 3 aŭ 4 prenoj, aŭ 4 por ŝlemo.

Kontraŭatutigantoj ludantaj kune, ricevas 2 por eŭkro. Kiam sola defendanto gajnas, tiu ricevas 2 por 3 aŭ 4 prenoj, aŭ 4 por ŝlemo.

Partio: la teamo kiu unue atingas sumon de kvin poentoj venkas. (Foje oni decidas fini ĉe 7 aŭ 10 poentoj).

Referenco

Hoyle's Rules of Games, Signet, New York, 1963. ★

Amo konkeras ĉion

Rakonto

de David Ryan

Lidia sidis ĉe fenestro de sia senadorna urbcentra apartamento kaj esploris. Ŝi pensis pri sia vivo, sen amo. Tra la fenestro ŝi vidis en la suba strato feliĉajn gejunulojn kiuj promenis brak' en brake kun evidenta granda amo. Lidia pensis pri sia vivo, sola en griza senĉarma urbcentra konstruaĵo sen amikoj, parencoj aŭ amato en fremda urbo.

Kio okazis al ŝia vivo? Antaŭ nur ses monatoj ŝi estis ege feliĉa, ĝis malbonŝanca tago kiam ŝia ĉefo diris al ŝi ke ŝi devas urĝe translokiĝi por estri novan oficejon en Berlino, tre for de ŝia tiama hejmo en Londono. Lidia respondis ke translokiĝo al Berlino ne eblas. "Mi ne parolas la germanan," ŝi diris al sia ĉefo. Tamen, oni preskaŭ minacis ŝin: se ŝi ne translokiĝos al Berlino, ŝi perdos sian laboron kaj promesplenan karieron. Por Lidia, ŝia laboro multe gravis al ŝi. Tamen, ankaŭ gravis ŝia amo por Johano. Johano estis la perfekta viro: alta, blonda, bluokula, sportema, inteligenta, kaj esperantisto. Ŝi eĉ pensis ke eble post iom da tempo ŝi volos geedziĝi kun li. Tamen, Johano tute ne povis akompani ŝin al Berlino: li devis resti en Londono por prizorgi sian mortantan maljunan patrinon.

Tial, Lidia kontraŭvole akceptis translokiĝon al Berlino kaj nun, ses monatojn poste, ŝi sidis ĉe fenestro kaj pensis pri sia senĝoja vivo sen Johano en Berlino en tiu vintro de 1985. Telefonvokoj kaj flugbiletoj estis tre multekostaj kaj, pro tio, ŝia kontakto kun Johano estis malofta kaj eĉ plimaloftiĝis. Ŝi ankoraŭ amis lin kaj Johano amis ŝin, sed ami longdistance ne facilas. Iu el ŝiaj kunlaborantoj parolis pri novaj teknologioj kaj diris ke post nelonga tempo eblos facile kaj rapide komuniki preskaŭ senkoste per komputilo. Kiel li nomis tion? Inter ...io, ĉu? Stulta homo!

La sekvan tagon, post tutnokta plorado, Lidia ellitiĝis kaj decidis ke, por ŝi, amo plej gravas en la vivo. Ŝi telefonvokis al la sekretario de la loka Esperanto-grupo kaj samideanoj tuj helpis ŝin porti ŝiajn valizojn al la stacidomo. Tie ŝi adiaŭis sian mizeran vivon en pluvema Berlino kaj entrajniĝis por Londono.

Du jarojn poste, ŝi piknikis kun amikinoj en Londona parko. Ŝi rankontis al ili pri sia reiro al Londono. Tie Johano atendis ŝin en la stacidomo. Kiam ŝi vidis lin, ŝi tuj sciis ke ŝia decido forlasi sian laboron en Berlino kaj reiri al Londono estis la tute prava decido. Mallongan tempon poste, ŝi akiris novan postenon en Londono, eĉ pli bonan ol la antaŭa. Johano petis ke ŝi geedziĝu kun li kaj nun ŝi atendas ilian unuan bebon. Ŝi rankontis al siaj amikinoj ke sidi plorante ĉe fenestro en malvarma tago en Berlino vere sciigis al ŝi ke amo pli gravas ol io ajn alia en la tuta vivo. ★



Kongreso en Wellington

Raporto pri la 2010-a Kongreso de NZEA

de David Ryan

La kongreso de NZEA okazis en studenta loĝejo, Weir House, en la ĉefurbo Wellington dum la lasta semajno de januaro.

Partoprenis 11 gesamideanoj, inkluzive de eksterlandaj vizitantoj el Germanio, Japanio, kaj Usono. Dum la tuta kongreso la suno forte brilis kaj la temperaturo ĉiutage estis tre alta.

Jarkunveno

Okazis la jarkunveno de NZEA, dum kiu reelektiĝis la sama Estraro kiel en 2009. En aparta sesio, membroj kontribuis al diskuto pri planado kaj strategio. La movado en Nov-Zelando ankoraŭ vivas sed mankas novaj volontuloj. NZEA havas novajn membrojn sed, bedaŭrinde, neniu el ili partoprenis la ĉi-jaran kongreson.

Lingvaj sesioj

La ĉefa instruisto por la lingvaj sesioj estis Sabine Trenner el Germanio. Ŝi parolis pri verkado de rakontoj, kaj instigis la ĉeestantojn verki. Post individua laboro ĉiu prezentis siajn diversajn rakontojn, el kiuj kelkaj aperos poste en Esperanto sub la Suda Kruco.

Donald Rogers ankaŭ gvidis sesion pri gramatiko, vortelekto kaj stilo en Esperanto. Kongresanoj demandis pri diversaj punktoj, kaj Donald provis klarigi.

Paroladoj

Jakobo Schwartz, vizitanto el Usono, prezentis sin. Li parolis pri la movado en Usono kaj diris ke multaj ne-esperantistoj ne konstatas ke ili havas problemon pri lingvoj; tial ili ne konscias ke Esperanto estas solvo. Iu demandis lin ĉu la nova usona Prezidento rezultigis veran ŝanĝon en la usona socio. Li

respondis ke la sistemo havas tiom da inercio ke estas tre malfacile signife ŝanĝi ion. En sia dua parolo Jakobo parolis pri sia hobbio: trikado.

Kelkaj kongresanoj prezentis parolojn pri diversaj temoj.

Donald Rogers parolis pri ĝardenado tra la lastaj kelkaj jardekoj. Li rimarkis ke ĝis ĉirkaŭ 1980 oni ĝardenis por manĝi, sed dum la sekvaj dudek kvin jaroj ĝardenado estis afero de riĉuloj. Tiam subite, pro la ekonomia regreso, denove oni kreskigas legomojn kaj fruktojn por ŝpari monon, sed gejunuloj devas lerni pri tio ĉar dum ĉirkaŭ 25 jaroj oni apenaŭ instruis pri tio.

Donald parolis ankaŭ pri la Esperanto Vikipedio kaj kuraĝigis aliajn verki kontribuojn, ilustrante kiel fari tion per klarigo pri sia artikolo pri kroketo.

Tony Jansen parolis pri sia porpaca varbado. Ŝi tradukis flugfolion de kontraŭmilita pacgrupo "Pax Animi" (Amiko de Paco) en Esperanton.

Sabine Trenner parolis pri lerneja projekto kiun ŝi estras por aĉeti kaj poste ripari kaj vendi biciklojn por infanoj. Junaj lernejoj administras la komercadon. Ĝi fariĝis projekto de UNESKO.

David Ryan parolis pri sia vojaĝo en Eŭropo kaj vizito al la Centra Oficejo de UEA kaj renkontoj kun Esperantistoj. Li ankaŭ parolis pri sia pasia intereso pri la konstruo, historio, kaj arkitekturo de katedraloj.

Gwenda Sutton parolis pri sia provo atentigi homojn pri Esperanto en la tiel nomata 4a Parlamento de Mondaj Religioj

kiun ŝi ĉeestis en Melburno en decembro 2009.

Distrado

Bradley McDonald parolis pri la Universala Kongreso en Bjalistoko en 2009. Tie li ĉeestis ĉiujn kunvenojn de la Komitato de UEA. Li ĉeestis la akcepton de la Urbestro de Bjalistoko (eĉ portis tajloritan kompletan por la okazo) kaj fieris ke la Urbestro bone parolis Esperanton. Li konstatis ke Bjalistoko fieras pri Zamenhof kaj vidis tie ekspozicion pri la juna Zamenhof. Laŭ Bradley, “Esperanto penetris la urbon”. Bradley fieris ke tiom da sindonemaj, kompetentuloj laboras kaj verkas por Esperanto. Li diris ke “Esperanto estas afero kiun neniu povas estingi”.

Erin McGifford prezentis teatraĵeton pri tempomaŝino kaj parolis pri diversaj temoj, inkluzive de sia ideo por ke katoj lernu Esperanton!

Donald Rogers preparolis krocketon, post kiu la kongresanoj iris al apuda kroketa ludejo por ludi krocketon. La vetero estis serena kaj varmega kaj ĉiuj ĝuis la ludadon.

Por la kongresa bankedo, ĉiuj iris al tajlanda restoracio. Survoje, la eksterurbanojn tre impresis krutaj serpentumaj stratetoj tipaj de Wellington. La kongresanoj ankaŭ vizitis kaftrinkejon, por sperti rekte kial oni nomas Wellington “kafeja ĉefurbo de Nov-Zelando”. En la lasta tago, pro ege varma vetero, oni decidis pikniki en la apuda Botanika Ĝardeno.

La loĝado kaj manĝoj ĉe Weir House estis bonaj kaj la partoprenantoj ĝuis la etoson de la kongreso, malgraŭ ke ĉi tiu estis eble la plej malgranda kongreso de NZEA en ĝia historio. La venontjara kongreso denove okazos en Weir House, plej verŝajne en la lasta parto de januaro. Krokeltulado, kiun ĉiuj ĝuis, certe estos konstanta programero por futuraj kongresoj de NZEA. ★

Krocketumantaj kongresanoj



Esperanto-historio

La komenco de la Movado en Sud-Aŭstralio

de Charles Stevenson

La ekesto de Esperanto tuj kreis intereson tra la mondo - precipe en Francujo kaj en Azio – oni esperis, ke Esperanto solvos la lingvajn problemojn en la komerco. En Aŭstralio oni opiniis, ke tie ne ekzistas problemoj pri lingvoj, ja ĉiuj parolis la anglan. Sed ili ne konsideris la germanan loĝantaron de la Barossa-valo! Ne surprizas nin, ke la estro de la Esperanto-movado en Sud-Aŭstralio estis german-naskita.

Temas pri s-ro C. A. Wittber, nomita “La patro de Esperanto en Sud-Aŭstralio”. Li instruis Esperanton al siaj studentoj unue ĉe Rose Park elementa lernejo, kaj poste en Gilles Street (ambaŭ en Adelajdo) kaj publikigis lernolibrojn de Esperanto. Tamen, lia plej grava atingo estis la esperantigo de Carl Uhrlaub – alia germano.

Uhrlaub (1856-1931) estis lingvisto. Li ofte prelegis pri literaturaj temoj, kaj post sia esperantistiĝo li prelegis pri “Esperanto kaj ĝia influo internacia” - ĉe ‘Speakers’ corner’ en la botanika ĝardeno, kie en dimanĉaj posttagmezoj oni povis paroladi pri iu ajn temo. Li parolis al ekleziaj grupoj, literaturaj societoj, al la ‘Trades Hall’, kaj al la asocio de instruistoj. Pluraj instruistoj ekinteresiĝis pri Esperanto.

De majo 1907 Kolegio Muirden (Muirden College), la ĉefa komerca kolegio de Adelajdo, tiel reklamis en ‘Advertiser’: “Esperanto”- lecionoj ĉe kolegio Muirden, Currie strato. “ESPERANTO,” akceptita de la plej eminentaj lingvistoj de la mondo kiel la lingvo internacia, estas nuntempe instruata ĉe la kolegio Muirden. La direktoro de la kolegio akiris kiel preleganton s-ron C. A. Uhrlaub, bone konatan lingviston kaj pedagogon. Ktp.

Ĉi tiuj lecionoj okazis vendrede je 7.30 pm. Bedaŭrinde, ni ne scias kiuj aŭ kiom ĉeestis ĉi tiujn lecionojn, krom ke dum la malferma kunveno s-ro Uhrlaub parolis al ‘modera grupo’. La espero estis ke tra Sud-Aŭstralio stariĝos esperantaj grupoj, kaj tiel antaŭenirus la movado de tuta Aŭstralio.

S-ro Uhrlaub skribis plurajn leterojn al la redaktoro de “Advertiser” subtenante Esperanton. Li opiniis, ke la ĉefa kialo de malamikeco en la mondo estas la problemoj de multaj lingvoj. Li diris: “Esperanto komencis la noblan taskon detruiri la muron de la lingva problemoj.” De la 8-a de aŭgusto 1910 ĝis la 13-a de decembro 1913 ĉiusabate aperis en “Advertiser” artikolo “Esperantaj notoj” de Ora Ĉenero, la plumnomo de Carl Uhrlaub.

Vera Esperanta grupo stariĝis la 13-an de oktobro 1908 ĉe la studio de fraŭlino Wilson, Konstruaĵo de Fonduso de Vidvinoj en Grenfell strato .

Ne ekzistas taglibroj, protokoloj aŭ aliaj informfontoj pri ĉi tiu grupo. Kiu estis ĝiaj anoj krom la studentoj de s-ro Uhrlaub? Ni scias nur ke la Adelajda klubo filiiĝis kun la Brita Esperanto-Asocio, kaj ke akceptiĝis reguloj kaj konstitucio. Ĝia estraro estis verŝajne la sekva: prezidantino Ada Hogg; vic-prezidanto s-ro C. Piggott; sekretario s-ro W. D. Smith; komitatanoj s-ino Alma Porter, s-roj Almgren (svedo) kaj F. G. Hooper . Ada Hogg kaj ŝia edzo instruis ĉe la komerca akademio.

Baldaŭ unuiĝis kun la grupo d-ro A. E. Shepherd, kuracisto kiu interesiĝis pri la skolta movado kaj futbalo.

En 1910 venis Adelajden la prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio: kolonelo Pollen, juĝisto kaj 'ege amuza individuo' laŭ 'Advertiser'. Lia prelego havis multajn aŭskultantojn kaj estis bone priraportita – precipe lia mesaĝo en Esperanto - al la junaj viroj:

“Vi junuloj havas grandan devon por plenumi- kresku, multbliĝu kaj plenigu la teron kaj venku ĝin – antaŭen Aŭstralio”.

Kolonelo Pollen aliris al Esperanto alian Germanon, majoron Hugo Leschen, kiu estis bone konata kiel fotografisto, soldato en la brita-bura milito, sed precipe bone konata kiel gimnastikulo. Lia patro studis kun la fondinto de gimnastiko en Germanujo. Tiutempe la esperantistoj kunvenis en la Leschen-a gimnastikejo en Pirie strato. Krome, Hugo Leschen, tre sperta en tiaj aferoj, organizis la unuan Esperantan Kongreson, en Adelajdo, en oktobro de 1911.

Post tiu kongreso estis fonditaj multaj grupoj, sed ni ne scias, ĉu ili sukcesis aŭ malsukcesis! Oni havas nur “Advertiser” kiel informfonto.

Menciindas, ke tiutempe “Advertiser” estis pli altkvalita ol nuntempe.

Foto de Carl Uhrlaub ĉirkaŭ 1911

Do, kio okazis al Esperanto en Sud-Aŭstralio?

La ĝenerala publika opinio estis ke Esperanto taŭgas en Eŭropo, kie ekzistas multaj lingvoj, sed Aŭstralio estas tute unulingva, ĉar estas tute Brita. Estante anglaj, la aŭstralianoj povas esti arogantaj. Sed en Aŭstralio vivis ne nur Britdevenaj loĝantoj. Memoru la homojn origine germanlingvajn! Por ili lingvo estis grava afero. Ili sciis kiel malfacilas lerni duan lingvon. Ĝuste ĉi tiu fakto klarigas kial Esperanto prosperis en Sud-Aŭstralio: la ĉefaj esperantistoj tie estis germanlingvuloj.

En 1914 eksplodis la unua mondmilito. Subite ĉio eĉ nur iomete germana estis konsiderata perfidulo. Malfacilas kompreni kiel povis tiomagrade anstataŭi racion ŝovinismo. Du fiekmuloj: la Melburna artmuzeo rifuzis pentraĵon de Hans Heysen kaj la Societo de artistoj de Sud-Aŭstralio rifuzis la membriĝon de Hans Heysen – ĉar li naskiĝis en Germanujo. Havi germanan familian nomon en si mem sufiĉis por kondamno. Kvankam Carl Uhrlaub skribis iam la “Novan Kanton de Aŭstralio”, liaj du filoj angligis Uhrlaub al Earle. Mi opinias ke en tiuj jaroj la estro de Esperanto evitis publikecon.

En sia ‘nova Kanto de Aŭstralio’, Uhrlaub skribis: “Fiera insula hejmo, ci neniam konos subpremecon de aroganta tiraneco” La tiraneco ne venis de eksterlando, sed ekzistis interne: ŝovinismo.

En Sud-Aŭstralio Esperanto neniam poste atingis la altojn de la antaŭmilita tempo. ★

Charles Stevenson esperantistiĝis antaŭ preskaŭ kvindek jaroj. Li estis profesoro de la angla lingvo je altlernejo kaj interesiĝas pri Esperanto - historio. En jaroj emeritaj li interesiĝas ĉefe pri rifuĝintoj. Post dudek jaroj li forlasis Esperanton kaj ĵus revenis denove.



Kiu mi estas?

de Philip Smart

Lastatempe, mi vizitis la IAMK (Internacia Asocio de Mortintaj Komponistoj), kie mi parolis kun iuj el la membroj. Mi proponis, ke ili diru al mi iom pri ilia vivo (aŭ morto, se tio estas interesa). La dek unu komponistoj, kiuj rakontis siajn historiojn, estas la jenaj (en alfabeto ordo): (a) P.D.Q. BACH; (b) Ludwig van BEETHOVEN; (c) Pjotr Iliĉ ĈAJKOVSKIJ; (ĉ) George Frideric HANDEL; (d) Franz Joseph HAYDN; (e) Johannes Chrysostomus Wolfgangus Theophilus (=Amadeus) MOZART; (f) Ignacy Jan PADEREWSKI; (g) Giacomo ROSSINI; (ĝ) Erik (Alfred Leslie) SATIE; (h) Franz Peter SCHUBERT; (ĥ) Antonio Lucio VIVALDI. (Bonŝance, ili ĉiuj parolas Esperanton!) Sube troviĝas tiuj historioj, en tute malsama ordo. Via tasko, se vi ĝin akceptos, estos konstati, por ĉiu historio, al kiu el la komponistoj ĝi apartenas. Estas strikte malpermesite rigardi la solvojn antaŭ ol fini vian taskon!

1. Mi naskiĝis kaj laboris en Venecio, kie mi estis instruisto de violono en L'Ospedale de la Pietà, lernejo por orfinoj, kiu havis tre bonajn orkestron kaj ĥorojn. La plejparto da miaj komponaĵoj estis verkitaĵoj por la knabinoj de tiu lernejo. Mia ŝercnomo estis "Il Prete Rosso" ("La Ruĝa Pastro"), ĉar mi estis ne nur komponisto, sed ankaŭ pastro, kaj jes, mi estis ruĝhara. Mi verkis tre multe da koncertoj, kiuj tiom similas unu al la alia, ke iuj diras, ke mi verkis unu koncerton, 450 fojojn; sed tio ne estas justa: fakte, mi verkis DU koncertojn, po 225 fojojn!

2. Mi naskiĝis en Halle, en Germanio, sed multe vojaĝis en Italio por lerni kiel komponi operojn laŭ la itala stilo, kaj en Anglio, kie mia muziko estis tiom populara, ke mi gajnis multe da mono tie. Mia dua vojaĝo al Anglio estis ankaŭ mia lasta; mi restis tro longe, kaj dum mi estis tie, la reĝo mortis; la nova reĝo estis mia eksmastro el Germanio! Mi timis, ke li estos kolera kontraŭ mi, sed male li redungis min, kaj mi restis en Anglio.

3. Mi naskiĝis en Rohrau, en Aŭstrio, sed dum mi estis ankoraŭ infano, mi fariĝis membro de la ĥoro de la Stephansdom (t.e. la Katedralo de Sankta Stefano) en Vieno. Mi havis tre bonan voĉon, sed mi ne ĉiam bone kondutis; unu fojon, mi rimarkis, ke la knabo kiu sidis antaŭ mi en la ĥoro havis harvoston, kaj mi havis la bonan ideon tondi ĝin: pro tio la ĥorestro elpelis min el la ĥoro. Sed estis bonŝance, ĉar, kiel mi poste lernis, li planis operacion por mi, por ke mia voĉo ne ŝanĝiĝu, sed restu knaba voĉo - mi kaj mia ekipaĵo estis sekuraj!

4. Ankaŭ mi estis aŭstro. Mi komencis mian karieron relative juna, ludante en koncertoj, kun mia fratino, en la grandaj urboj kaj reĝaj kortegoj de Eŭropo. Kiam mi estis en Francio, mi proponis al Marie-Antoinette ke ŝi oni geedziĝu, sed ŝi ne volis; ni ambaŭ havis sep jarojn. Mi komencis komponi por la piano kiam mi havis preskaŭ kvin jarojn, mia unua verko por ĥoro je naŭ jaroj, kaj mi havis jam dek du jarojn kiam mi verkis mian unuan operon. Estas bonŝance ke mi komencis tiel frue, ĉar mi vivis nur tridek ses jarojn; sed en tiu tempo mi verkis grandegan amason da muziko, inkluzive almenaŭ kvardek unu simfoniojn.

5. Kvankam mi estis germano, mi havis nederlandan nomon, ĉar mia avo estis flandro. Mi naskiĝis en Bonn, sed transloĝiĝis al Vieno kiam mi havis dudek du jarojn. Mi neniam estis tre afabla homo, sed mia karaktero malpliboniĝis dum mia vivo. La fakto ne helpis, ke mi laŭgrade surdiĝis ĝis kiam mi havis preskaŭ kvindek jarojn. Post tiam, mi estis tute surda. Tio estis pro venenigo per plumbo - ne pro sifiliso, kiel oni ofte diras. La kaŭzo estis la vino blanka, kiun mi tiom

ŝatis. Mi trinkadis ĝin el metalo kiu enhavas plumbon; la vino, estante tre acida, solvis multe de tiu plumbo, kiun mia korpo sorbis. Do miajn plej maturajn komponaĵojn mi verkis sen povi aŭdi eĉ unu noton. Mi verkis nur naŭ simfoniojn (sed ili estas pli longaj - kaj laŭtaj! - ol tiuj de komponisto Numero 4).

6. Mi estis vienano, kaj, kiel Numero 4, mi komencis frue. Kiel eta knabo, mi kantis en la ĥoro de la Reĝa Seminario. La aliaj ŝercnomis min "Schwammerl", kiu signifas Ŝampinjoneto, ĉar mi estis malalta kaj iom graseta (mi ankaŭ portis etajn rondajn okulvitrojn). Mi komencis lecionojn de muzikkomponado kiam mi havis dek unu jarojn, kaj verkis la unuan el miaj ok kaj duono simfoniaj je dek du jaroj. Mi verkis ankaŭ centojn da kantoj, kaj multajn aliajn komponaĵojn por diversaj instrumentoj. Mi mortis eĉ pli juna ol Numero 4, je tridek unu jaroj.

7. Mi estas la sola rusa komponisto en tiu listo. Mi venis el Peterburgo, kaj verkis muzikon en diversaj formatoj, sed mi estas eble plej bone konata por miaj ses simfonioj (precipe la tri lastaj) kaj miaj baletoj. Mi estis iom neŭroza, kaj provis mortigi min du fojoj. Je la unua fojo, mi staris en la Rivero Neva dum malvarma vetero, esperante ke mi kaptos pneŭmonion; mi nur malvarmumegiĝis. La duan fojon, mi trinkis venenon, kaj sukcesis.

8. Mi estis italo. Mi verkis ĉefe operojn, sed ofte forĝesis komponi la uverturojn. Mi estis tre mallaborema, kaj oni ŝercnomis min "Il signor Crescendo", ĉar mi emis preni unu frazon, kaj ripeti ĝin multe da fojoj, ĉiufoje pli laŭte ol antaŭe. "Crescendo" estis bona nomo. Ankaŭ pro tio, ke mi "kreskis" dum mia vivo, estante "bona vivanto" kiu tre ŝatis tro manĝi kaj drinki. Mi ankaŭ kuiris, kaj inventis pladon kiu portas mian nomon - pladon ege riĉan! Unu fojon, kiam mi estis en Milano, ĉe La Scala, oni enfermis min en alta ĉambro kun kelkaj gardistoj, por verki uverturon kiun mi forĝesis; kiam mi finis paĝon, oni prenis ĝin kaj ĵetis ĝin tra la fenestro al kuriero kiu liveris ĝin al la kopiistoj. Oni ordonis la gardistojn ke, se mi ne finis, ili ĵetu min mem tra la fenestro!

9. La urbo en kiu mi naskiĝis estis en tiu tempo en la Ukraino, sed mi estis de pola familio. Tre konata pianisto, mi komponis ĉefe por tiu instrumento. La kialo por mia ĉeesto en tiu listo estas ke mi fariĝis la tria ĉefministro de Pollando ĵus post la unua mondmilito.

10. Naskiĝinte en Honfleur en Normandio, mi certe estis iom stranga homo - iuj diris "frenza" - sed vere nur mistikulo kaj monomaniulo. Mia vivo estis regata de la horloĝo: ĉiun tagon la sama rutino - ĉiu agon je la sama horo - eĉ la sama minuto. Miaj verkoj por piano estas ofte sen melodio, kaj ankaŭ la harmonio estas "speciala". Mi donis strangajn nomojn al miaj verkoj, kiel ekzemple aro de tre mallongaj pecoj kun la nomo "Sekigitaj Embrioj", kaj alia nomita "Aŭtentikaj Malfermaj Preludoj (por Hundoj)". Ho jes, mi forĝesis, mia tuta manĝaĵo devis esti blanka. Kial ne?

11. Ne estas eble diri al vi kie mi naskiĝis, ĉar mi ne naskiĝis. Mia patro estis tre grava germana komponisto, kaj tre fekunda viro; tre produktema de muziko, kaj ankaŭ de infanoj, havante dudek gefiloj: mi estas la ne-ekzistanta dudek-unua. Mi vivis en la belega urbeto Wein-am-Rhein, kiu, kiel mi, neniam ekzistis. Sed ne estas tute vere ke mi nek naskiĝis nek vivis, ĉar mi naskiĝis en la kapo de usona muzikolog-komponist-humoristo. Do, laŭ la historio mi vivis en la dek-oka jarcento, sed naskiĝis multe pli malfrue, en la dudeka. ★

Tiu Mi Estas! (La Solvoj!)

1-(ĥ); 2-(ĉ); 3-(d); 4-(e); 5-(b); 6-(h); 7-(c); 8-(g) - Ĉu vi konas la Tournedos Rossini? Se ne, vi povus Google-umi la recepton; sed mi antaŭ sciigu vin, ke la nura legado de ĝi estas dikiga; 9-(f); 10-(ĝ); 11-(a). (Dankon pro la informoj al David Barber, kaj lia libro "Bach, Beethoven and the Boys".)

Literatura ero

Kvazaŭ ĉio dependus de mi


de Trevor Steele

Flandra Esperanto-Ligo (www.esperanto.be) eldonis meze de ĉi-jaro la novan verkon de Trevor Steele: "Kvazaŭ ĉio dependus de mi".

La romano estas baze la biografio de heroo ĵurnalisto Kurt Lenz, kiu fariĝis pacifisto post siaj spertoj en la Unua Mondmilito, kaj poste dediĉis sian talenton al oponado al naciismo kaj militismo. Pro tio li estis inter la plej unuaj viktimoj de la nazioj. La rakontanto Erich Schwalbe estis la bofrato kaj plej bona amiko de Kurt.

Malgraŭ siaj klopodoj Kurt malsukcesis ĉe la abitura ekzameno. Plej malbone li atingis ĉe matematiko. S-ro Wessels komentis: Kion oni atendu de lerneĵano, kiu eĉ ne povas enkapigi al si la teoremon de Pitagoro?

Trevor Steele



Onklo Gustav pretis pagi, ke Kurt faru kurson por sin prepari al dua provo sukcesi ĉe la abituro. Kurt volis tuj ekserĉi laboron kaj repagi ion al la geonkloj, sed Gustav estis eĉ pli obstina.

"Knabo," li diris, "se vi intencas pasigi la vivon sen abitura kvalifiko, vi neniam havos postenon, kiu permesos al vi inde kontribui al niaj enspezoj."

La abruptparola onklo maskis sian bonkorecon per ŝajna egoismo, kaj tio efikis. Dum kelkaj monatoj Kurt iris al Akademie Albert Wieland, kie instruistoj provis plenigi la kapojn de siaj klientoj per tiuj scioj, kiuj malfermos la pordojn al bona kariero. Semajnfine, almenaŭ unu fojon monate, Kurt transveturis la riveron kaj vizitis nin. Li ĉiam havis ian legaĵon en la poŝo, plej ofte ion de Goethe, Schiller, aŭ Hölderlin. En tiu tempo li ofte surpaperigis proprajn poemojn, kaj ni – Paula kaj mi – estis eble la solaj homoj, kiuj ilin aŭskultis (la geonkloj diris, ke tiaj poemoj estas "burĝaj afektaĵoj"). Iom post iom mi rimarkis, ke al Paula vere plaĉas tiaj emociaj elverŝaĵoj pri

*ĉielarkgloraj birdoj
en verdaj arbobaldakenoj
de la koro*

(Mia juĝo similis tiun de la geonkloj). Mi bezonis longan tempon

Kvazaŭ ĉio dependus de mi



F E L

por kompreni, ke la aprobo de Paula estas al Kurt kvazaŭ akvofonto al mortsoifa cervo. Jes, tamen, Kurt Lenz videble enamiĝis al mia fratino. Tio vere surprizis min. Paula estis nur mia malgranda fratino, iom malfacila homo, tro ofte humoraĉa – sed nun, jes, mi vidis, ke dekkvinjara ŝi havas junvirinan formon kun belaj kruroj kaj elstaraj mamoj. Mi ne memoras,

kiel mi fine sciigis Kurt, ke mi komprenas liajn motivojn elteni vomvekajn veturojn trans la maron. Eble mi esprimis min tiel, ke li kredis, ke mi ĵaluzas, ĉar li preferas la kompanion de mia fratino al mia.

Li diris, se mi bone memoras, “E-Erich, vi estos ĉ-ĉiam mia amiko. Sed estas io aparta, sciui, pri g-geaj rilatoj.”

“Nu jes,” mi probable grumbliis. “Sed mia fratino? Kurt, ŝi estas apenaŭ pli ol bebo.”

Li aspektis amuzata. “I-iam vi diris al mi, ke p-plaĉas al vi tiu Dorota, la filino de la p-poloj en nia strato, ĉu ne?”

“Jes, sed Dorota estas ekzotika, junmatura, preskaŭ virino.”

“Ankaŭ mi f-foje atentis pri D-Dorota. Ŝi estas unu jaron pli juna ol Paula. Kaj tute ne ŝ-ŝatas poemojn.”

Ekde tiam mi devis vidi Paula per novaj okuloj. Jen mi, altkreska sed ankoraŭ maldika junuleto tute malsimila al plenkreska barbulo, kaj Paula, jes Paula, fizike jam virino kapabla flamigi la koron de Kurt.

Poste ni diskutis miajn planojn. Mi sukcesis ĉe la abituro kaj intencis ekstudi juron. Fakte mi provis persvadi ankaŭ Kurt pensi pri tia kariero “tuj, kiam vi havos la abituron”.

Kiam mi ĝisis lin ĉe la pramkajo, mi subite konsciis: Kurt Lenz parolis tute flue kaj apenaŭ balbultis tiun tagon. Ĉu la amo povas venki ankaŭ tion?

Sed ankaŭ la duan fojon li malsukcesis ĉe la abituro. Sendube tio tre ĉagrenis lin, sed li ŝajnis, ke la afero iom amuzas. Li povis laŭvorte citi la unuan taskon en la ekzameno pri la germana. Oni donis al li la frazon: Post du monatoj granda parto de la klientoj, kiuj mendis la tutan enciklopedion, estos ricevintaj almenaŭ la unuajn ses volumojn, kondiĉe ke la eldonejo ne estos bankrotinta. Li devis unue difini la gramatikan rolon de ĉiu vorto en la frazo, kaj poste disigi la frazon en propoziciojn kaj klarigi la rilatojn al la ceteraj. Mi tute ne dubas, ke Kurt kapablis plenumi tiun taskon, sed li ridegis – li, kiu malofte eĉ ridetis, maskis sian frustrigon per ridado – pri tia “p-papereca lingvaĵo”.

Post tiu humiliga dua malsukceso (kaj ree estis lia manko de scioj pri matematiko kaj natursciencoj, kiuj fiaskigis lin) Kurt decidis ĉiukaze serĉi postenon ian ajn. Li tre amis la literaturon de nia lingvo, sed tio ne metus panon sur la geonklan tablon.★

Torquay "Aqua" Prezentado

de Kam Lee kaj John Adams

Sabate 5-an Decembron 2009, okazis Torquay "Aqua" prezentado, kiu okazis ĉe la marbordo je "Varmagrabla" (Cosy) Angulo en Torquay dum la krepusko. Proksimume 2 mil personoj ĉeestis.

La prezentado temas pri la rakonto "La Rakonto" verkita de Troy Parker kaj estas verko ludita ĉefe de la grupo Circus 3230, kiu konsistas de dancistoj, akrobatistoj kaj ĵonglistoj. La nombro 3230 alludas al la poŝtkodo de Anglesea, kiu estas la komencloko de la grupo. La verko estis akompanata de muziko ludita per latunaj instrumentoj, lignaj blovinstrumentoj kaj tamburoj. La rakontisto estis Miranda Lutz kaj la rakonto estis parolata en Esperanto.

La prezentado temas pri ŝongo de knabino, (Miranda Lutz), kiu estas ankaŭ la rakontistino. La ĉefrolantoj en la ŝongo estas la luno (Maddison Eyre), kaj la terloĝantoj kiuj konsistas de la forkaptantoj, la turkonstruantoj kaj la lunliberiganto (Dylan Lester).

Kam Lee fotisto | Maddison Eyre kaj Miranda Lutz



Unufoje la luno vizitis la teron por trovi kamaradecon. Neantaŭvidante, kelkaj el la terloĝantoj estis ĵaluzaj pri la lumkapablo de la luno, do ili forkaptis ŝin.

Mankis lumo en la ĉielo, pro la neesto de la luno. Anstataŭ liberigi la lunon, la terloĝantoj provis konstrui turojn, kiuj havis lumojn ĉe ĝiaj suproj. Malgraŭ multaj provoj, la altaj konstruaĵoj renversĝis.

Unu el la terloĝantoj opiniis, ke estus pli bone liberigi la lunon. La luno sukcese liberiĝis el ŝia malliberejo, sed la lunliberiganto estis minacata de la forkaptantoj. La luno savis la heroon per a uzo de sia brileco, kiu hontigis la forkaptantojn sed ankaŭ timigis ilin esti forlasitaj en la mallumo. La luno pro kompato levigis ĉielen ĉiujn el la terloĝantoj, kiuj fariĝis la steloj en la ĉielo.


The Story

I would like to tell you a story about a dream I had when I was just a little girl, a dream about the moon and the stars and how they came to be in the heavens. Come follow me into my dream.

This is my dream world a place of twilight where the Moon alone was the only light in the night sky. For an eternity she had looked down on the inhabitants of my dream. Lonely in her solitude she descended from the heavens to walk upon the earth in the hope of finding company.

They had watched as the Moon had stepped down from the heavens, they had seen her land upon the lonely shore. Dark creatures, jealous of the light she possessed and wishing it was their own, set out to capture her. ★

Kam Lee fotisto | grupo Circus 323



Parolu Esperanton!

Instruu Esperanton al via dombesto

de Erin McGifford



Kiel vi scias, ne estas sufiĉe da esperantistoj en la mondo kaj ni ofte cerbumas pri tio, kiel ni povas pligrandigi la nombron.

Eble vi opiniis, kiam vi legis la titolon de mia parolado, ke la problemo tro turmentis min kaj ke mi elpensis frenezan solvon.

Tio ne pravas.

Do, mi klarigos.

Unu el la celoj de bona esperantisto estas ke li aŭ ŝi lernu paroli la lingvon en flua maniero. Por fari tion, oni devas ekzerci sin.

Kelkaj bonŝancaj samideanoj havas alian esperantiston en la sama domo; aŭ regule parolas kun aliaj esperantistoj, eble per la telefono.

Lastan jaron esperantisto en mia urbo veturigis sian maljunan patrinon al la klubo.

Mi miris ke ŝi tiel flue parolis la lingvon, ĉar ŝi ne ĉeestis la klubkunvenojn dum multaj jaroj.

Ŝia filo diris al ni, ke kiam ili interparolis telefone, ili ĉiam parolis nur en Esperanto.

Tamen, al aliaj homoj, mankas la oportuno ofte paroli kun aliaj esperantistoj. Do, kion fari por gajni fluecon?

Mi havas solvon.

Ekzistas vera armeo de volontuloj kiuj estas pretaj helpi nin.

Ili estas niaj dom-bestoj: katoj, hundoj, birdoj, ktp.

Preskaŭ ĉiu dua hejmo en NovZelando havas katon, ekzemple, kaj posedanto de dom-besto kutime parolas al sia besto.

“Ho Klementino, vi ja estas la plej bela kato en la tuta mondo!”

“Maria! Ne ŝiru la seĝon per viaj ungoj!”

“Ambrozio! Rigardu tion kion mi aĉetis por vi hodiaŭ”

Do, ne parolu al via dombesto en via nacia lingvo. Uzu Esperanton! Tiamaniere vi povos paroli Esperanton ĉiutage.

Ne necesas limigi la temojn de via paroladoj. Vi ja ofte parolas amike al via besto, aŭ pri la mangaĵo kiun vi donos al ĝi, ktp. Vi ankaŭ povas paroli pri la vetero, aŭ viaj agoj:

“Kia bela tago, Felikso! Mi certe laboros en la ĝardeno hodiaŭ”.

Informu vian hundon pri la monda situacio:

“Grava tertremo okazis en Haitio hieraŭ, Teodoro. Mi donos monon por helpi ilin.”

Ĝis nun mi parolis pri anoncoj, kaj informoj. Sed vi ankaŭ povas fari demandojn.

Demandu vian kuniklon:

“Kion mi manĝu por la vespermanĝo hodiaŭ, Edvino? Ĉu la bifstekon aŭ la omaron?”

Petu de via papago:

“En la interreto estas ekscita reklamo pri kiel fariĝi tre riĉa. Oni devas nur sendi malgrandan monsumon al Niĝerio por komenci. Ĉu mi faru tion aŭ ne, Ferdinando?”

Plejeble la besto ne donos al vi detalan respondon. Sed kiel vi scias, estas utile fari tiajn demandojn por klarigi viajn proprajn pensojn al vi mem.

Nun, ion pri la lingva nivelo.

Kiam vi komencos vi baldaŭ ekscios ke vi ne konas la vortojn por diversaj oftaj temoj.

Jen via oportuno por pligrandigi vian scion. Prenu unu el tiuj nekonatajn vortojn kaj elserĉu ĝin en la vortaro. Aŭ demandu de spertulo. Skribu la rezulton por lerni ĝin.

Ne donu al vi mem tro da laboro. Eble elserĉu nur unu aŭ du vortojn en la tago.

Eble metu poŝ-libron en kuireja ŝranko kun paĝo de vortoj rilate al la kato, ekzemple felo, ungoj, kolumo, kremo, bifstekoj, ĉokolado kaj alian paĝon rilate al la domo, ekzemple, forno, lavi la telerojn.

Relegu la paĝon de tempo al tempo kaj uzu la novajn vortojn.

Se vi trovas problemojn pri kiel traduki ion, prenu ĝin al la klubo. Ĝi povus esti interesa ekzerco tie, ekz “The wife threw a wobbly when I said me and Herb were ducking down the road for a quick one”; or “My hubby wouldn’t know what an iron was if he fell over it”.

En konkludo, parolu al via dombesto en Esperanto kaj via flueco pliboniĝos.

Kaj poste, kiam vi invitas al via hejmo eksterlandan Esperantiston, vi nun diros:

“Olga, vi trovos la ... er ... (foliumas vortaron) mielon en la ... er ... (foliumas

ŝranko super la ... er ... (foliumas stablo”, se vi jam diskutis tiajn temojn kun via kara, bela, ĉiam-atenta kato. ★

IFEF deziras tutmondiĝi

I.F.E.F. estas la monda organizo de la fervojistaj esperantistoj

de Jindřich Tomášek

I.F.E.F. estas mallongigo por Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, monda organizo de la fervojistaj esperantistoj. Ĝi estas faka, kultura organizo, neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko kaj sociaj problemoj kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj.

Fondita dum la 5-a UK en 1909 en Barcelono, kun interrompo de la evoluo kaj agado dum ambaŭ mondmilitoj,

Ĝi do kunligas la fervojistajn (kaj iujn alitrafikistajn) esperantistojn jam pli ol cent jarojn.

La nuna IFEF refondiĝis post la dua mondmilito en la jaro 1948 en Amsterdamo kun komence 250 registritaj membroj kaj en la sama jaro oni sukcesis denove aperigi regule sian revuon. Ekde la jaro 1949 IFEF aranĝas ĉiujare sian kongreson, okazanta laŭ la invito de iu landa asocio aprobite de la Komitato. La ĉijara 62-a IFEF kongreso

© Uatp1 | [Dreamstime.com](https://www.dreamstime.com)



okazos de la 8-a ĝis 15-a de majo 2010 en Sofio, Bulgario.

Konstanta evoluo post la dua mondmilito karakterizas la IFEF-movadon, kaj ĝi fariĝas la plej forta kaj la plej aktiva faka organizo de UEA.

IFEF havas gravan fakan Teknikan Komisionon, kiu konsistas el Terminara kaj Fake Aplika Sekcioj.

La Terminara Sekcio funkcias ekde 1950, kaj ĝi konsistas el fakuloj de la landaj asocioj, pluraj el kiuj eldonis fervojfakan terminaron. La plej granda laboro kaj rezulto de tiu Sekcio estis traduko de la seslingva surpapa faka terminaro de UIC (Internacia Fervojunio), enhavanta pli ol 15.000 pure fervojfakajn terminojn. La lasta eldono de la terminaro estas akirebla en 20 lingvoj sur CD-ROM. UIC prilaboras la difin-vortaron kaj, paralele de tiu, IFEF preparas Esperanto-varianton. De tempo al tempo la Terminara Sekcio eldonas periodaĵon por la kunlaborantoj sub la titolo „Terminara Kuriero“ (TeKu). La Fake Aplika Sekcio komencis funkcii en la jaro 1959. Ĉiujare en la IFEF-kongresoj la plej grava programero estas la ĉefa prelego, kiun ĝenerale la organizanta lando preparas kaj prezentas. Ekde la jaro 1981 tiu ĉi Sekcio kompletigas la programon per la tielnomata programero „fakprelegetoj“. La nombro de diversnaciaj prelegantoj varias inter 6 kaj 12. Tiuj prelegetoj informas pri la plej freŝaj fakaj novaĵoj en la koncernaj landoj. Krom tiuj ĉi kongresaj programeroj daŭre aperadas fakaj artikoloj en la revuo „Internacia Fervojisto“, kiu aperas sesfoje en jaro, krome ankaŭ en fervojfakaj revuoj de la landaj asocioj. Per tiuj fakartikoloj oni kontribuas al la plimultigo kaj interŝanĝo de la fakaj konoj.

IFEF ĉiujare aperigas fakan kajeron sub titolo „Fervojfakaj Kajeroj“, tiel eldonante la plej valorajn fakajn prelegojn kaj aliajn fakajn tekstojn. Ĝis nun aperis 17 tiuj kajeroj.

Grava atingo estas ankaŭ, ke pluraj landaj asocioj aperigas la klarigan tekston de la fervoja horarlibro en Esperanto.

Rimarkindas ankaŭ, ke la estraro jam eldonis la Historion de IFEF en tri okazoj, nome volumojn pri la periodoj 1909-1968 (60-a fondaĵtreveno), 1909-1984 (75jara jubileo) kaj Suplementon pri la jaroj 1984-1999 (90jara datreveno). Estas preparata nova kompletigita eldono de la Historio okaze centjariĝo de IFEF, eldonota espereble antaŭ la ĉijara IFEF kongreso en Sofio.


La 9-an de oktobro 2009 estis solene inaŭgurita en Esperanta Muzeo en urbo Svitavy, Ĉeĥio granda ekspozicio, organizita en kunlaboro kun ĉeĥa landa asocio de IFEF kaj dediĉita al centjariĝo de la fervojista E-movado. Sur diversaj tabloj, en vitrinoj kaj ŝrankoj estas prezentitaj dokumentoj, libroj, vortaroj, fotografaĵoj, insignoj kaj aliaj memoraĵoj prezentantaj la centjaran historion de la fervojista E-movado kaj IFEF. La ekspozicio estas vizitebla ĝis somero ĉijara.

Membraro de IFEF konsistas el aliĝintaj membroj de laŭstatute organizitaj landaj asocioj, individuaj membroj el landoj, kie ne ekzistas landa asocio, honoraj membroj k.t.p. Krom plimultaj eŭropaj landoj ekzistas landaj asocioj en Ĉinio kaj Japanio, kaj individuaj membroj en kelkaj aliaj landoj kiel Britio, Nederlando, Hindio, Svislando k.t.p.

Mi alvokas fervojistajn eĉ alitrafikistajn esperantistojn aliĝi al nia fervojista E-movado, fariĝi asociaj aŭ individuaj membroj de IFEF. Pluajn informojn vi povas peti de via landa kontaktulo aŭ rekte de la ĉefkomitatano:

Jindřich Tomášek, CZ-751 18 Říkovice n-ro 33, Ĉeĥio, retadreso Tomisek.ck@seznam.cz, aŭ de la IFEF-kasisto: Laurent Vignaud, 3 Allée du Haras, App 132, FR-49100 Angers, Francio, retadreso laurent.vignaud@free.fr . ★

Jindřich Tomášek estas la ĉefkomitatano de IFEF.



Triesta Esperanto-Asocio



lanĉas

la 4^{an} Internacian Konkurson - jaro 2010
pri la temo:

Kristnaska Poezio

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la **15^a de novembro 2010**, siajn verkojn al la jena adreso:

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Via del Coroneo 15—IT-34133 TRIESTE—Italia

Oni rajtas kontribui pri la supre indikita temo, per unu aŭ pli da faritaĵoj laŭ la kategorio:

Kat. 1) Desegnaĵo (ekz: “kiel mi imagas tiun tradician feston”, “la Kristnaska Kripo”, “familia festo”);

Kat. 2) Rakonto aŭ poeziaĵo, maksimume unu A4-formata folio (ekz: kiamaniere oni festas ĝin familie, pensoj pri tiu kristana festo, pri kristnaskaj tradicioj en propra lando, regiono, urbo; malgranda rakonto aŭ poeziaĵo pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ...);

Kat. 3) Manfaritaĵo (el ĝipso, ligno, metalo aŭ papero, aŭ el iu ajn alia materialo).

La ĵurio atribuos al **Kat. 2)** aldonajn 5 poentojn por favori la partoprenon en tiu ĉi branĉo.

La “rakonto” aŭ “poeziaĵo” estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj.

Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj:

- * persona kaj familia nomoj;
- * malgranda foto de la aŭtor/in/uo;
- * aĝo;
- * lernejo kaj klaso;
- * poŝta adreso.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2010.

La vizitontoj donos poentojn al la plej bela verko el la tri kategorioj, kaj tiuj ĉi aldoniĝos al la poentoj de la ĵurio.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj [A]; de 9 ĝis 11 jaroj [B]; de 12 ĝis 14 jaroj [C]) enkadre de publika ceremonio en Trieste.

Por kromaj detaloj/informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.it



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

David Ryan | President
ryangomez@xtra.co.nz

Chris Krägeloh | Vice-President
esk@esperanto.org.au

Donald Rogers | Treasurer
dero2648@clear.net.nz

Bradley McDonald | Secretary
bradley.m@woosh.co.nz

Howard Gravatt | Assistant Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erin.mcgifford@press.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the public about Esperanto, and organising the annual NZEA conference.



Australian Esperanto Association

Australian Esperanto Association
PO Box 339
Pascoe Vale South Vic. 3044
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
(+61 2) 9319 4775

Dianne Lukes | President
prezidanto@esperanto.org.au

Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Stephen Pitney | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Miranda Lutz | Dir. of Member Services
servoj@esperanto.org.au

Tim Stackpool | Director of Promotion
informado@esperanto.org.au


Jennifer Bishop | Director of Education
edukado@esperanto.org.au

Yaw Ampomah Badu | Dir. of
Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

Study Esperanto in sunny southern California!



NASK

La Nord-Amerika Somera Kursaro
(The North American Summer Esperanto Institute)

41st year!!!

June 27-July 16, 2010

To be held at the University of California, San Diego



Intermediate

Katalin Kovats
Lee Miller

Advanced

Grant Goodall Orlando
Raola
Amri Wandell Duncan
Charters

- ✚ A beautiful ocean locale at a world-renowned university
- ✚ Three weeks of intensive Esperanto studies
- ✚ Intermediate and advanced levels
- ✚ Five college credits (\$1674) from the University of California
- ✚ Teachers and classmates from around the world
- ✚ Evening and weekend programs: music, games, trips and more!
Guest speakers and new international exams.
- ✚ Single rooms with three meals daily \$1305
- ✚ Study then leave directly for the International Congress
- ✚ Scholarships available especially for teachers or college students



FOR MORE INFORMATION, SEE: <http://esperanto.org/nask>

Or contact the NASK Coordinator, Ellen Eddy: 11736 Scott Creek Drive SW ° Olympia, WA 98512

Usono (USA)(360) 754-4563 ° EddyEllen@aol.com